# JARLIBRO

1945

DUA PARTO

NEPRE LEGU PAĜON 4

Kun FILATELA TERMINARO
de
Herbert M. Scott, L.K.

Internacia Esperanto-Ligo

SPE

Herbert M. Scott, L.K.

# FILATELA TERMINARO

**Esperanta—Angla—Franca—Germana kun difinoj en Esperanto.**

★

Ĉi tie represita laŭ afabla permeso de S-ro Teo Jung.

Apartaj ekzempleroj de la *Filatela Terminaro* estas haveblaj ĉe I.E.L. po 10 pencoj aŭ tri internaciaj respondkuponoj, afrankite.

## ANTAŬPAROLO

En Januaro 1923 mi estis difinita Fakestro pri Filatelo de la Teknika Sekcio de la Lingva Komitato. Mia tasko estis prepari fakterminaron, kiu, post trakontrolo de diverslingvaj kompetentuloj, estus submetata al la Lingva Komitato por eventuala oficialigo. Sufiĉe plenan terminaron mi estis jam delonge kolektinta, kun helpo de s-ro Robert S. Woolf, el Blairsville, Pa., Usono. La sola malbono estis, ke mi ne povis trovi praktikajn rimedojn por prezenti la liston al la trarigardo de la tutmonda filatelistaro Esperantista. Fine la redakcio de *Heroldo de Esperanto* bonvolis permesi, ke mi enpresadu, partope, mian terminaron en tiu gazeto. Ĝi do aperis en la numeroj 47–53 (1926), inkluzive. Mi tiutempe petis, ke la kompetentuloj sendu al mi kritikojn pri ĉiuj ingrediencoj de la terminaro. Nur unu komunikon tian mi ricevis, de s-ro Robert Kreuz, tiama sekretario de ICK, pleje tute aproban, nur kun kontraŭopiniaj notoj pri kelke da eroj. El tio mi iom rajtas konkludi, ke niaj samfakanoj ne trovis en mia verko tre gravajn erarojn. Mi do kompletigis la liston, korektis iomete la parton publikigitan, kaj nun proponas la tuton al nia kolegaro, dezirante, ke ĝi faciligu la internaciajn filatelajn rilatojn per Esperanto, kaj samtempe unuecigu tra la mondo la uzadon de la faklingvaĵo.

La plano de la Terminaro estas jena: 1. La termino en Esperanto. 2. Fonto de la termino. Sed troviĝas **nenia** fontindiko a) ĉe simpla vorto oficiala (t. e. apartenanta al la Fundamento, aŭ al unu el ĝiaj tri Aldonoj); b) ĉe vorto kunmetita, se ĉiu elemento estas Fundamenta radiko, esceptinte se la vorto estas prete prenita el iu unu verko. La (tre malmultaj) novaj radikoj proponataj de la kompilinto estas signitaj per steleto. Interkrampaj ciferoj apud kelkaj radikoj aludas samciferan Noton en la fino de la Terminaro, klarigantan speciale la motivon elekti la resp. radikon prefere ol aliajn eblajn. 3. Traduko en la lingvoj angla, franca, germana (en la dirita ordo). 4. Difino de la termino en Esperanto. 5. Fonto de la difino, se ne tuta de la kompilinto mem.

Fine, oni notu, ke mi penis pritrakti terminojn nur sufiĉe specialajn por nia scienco. La ordinarajn vortojn (ekz. **ruĝa, blua, koverto,** ktp.), kiujn ĉiu scias el la komuna lingvo, mi preterlasis. Tamen kelke da "memkompreneblaĵoj" entroviĝas pro teknikeca traduko en unu aŭ alia lingvo. Ekz. **ankro kun kablo**—angle "foul anchor".

HERBERT M. SCOTT, L.K.



## FONTOVERKOJ KUN MALLONGIGOJ

B. — Plena Vortaro Esperanto-Esperanta, de Boirac.

D. — Wörterbuch Deutsch-Esperanto, de Zamenhof.

F. — Dictionnaire Complet Français-Esperanto, de Grosjean-Maupin.

Far. — La Faraono, de Kabe.

F. K. — Fundamenta Krestomatio, de Zamenhof.

F. L. — English-Esperanto Dictionary, de Fulcher and Long.

G. — Dictionnaire Complet Esperanto-Français, de Grosjean-Maupin.

K. — Vortaro de Esperanto, de Kabe (la ciferoj post "K." signas la ordon de la senco en tiu vortaro).

L. — Vocabulaire Français-Esperanto (de la Philatélie), de René Lemaire.

M. — Esperanto-English Dictionary, de Millidge.

Mar. — Marta, de Zamenhof.

R. — Plena Vortaro Esperanta-Rusa, de Zamenhof.

T. — Traduction de Poste International (dek lingvoj, kun Esperanto).

V. — Enciklopedia Vortareto, de Verax.

W. — Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana, de Wüster.

Z. — Zamenhof.

Catalogue de Timbres-poste, de Yvert et Tellier-Champion.

Philatelic Dictionary, de B. W. H. Poole and Willard O. Wylie.

Postwertzeichenkatalog, de Senf.

Alfabeta traduktabelo de la Senf-katalogo (kvin lingvoj, kun Esperanto).

Scott's Standard Catalogue (Usono).

Wörterbuch zu Kohl's Briefmarken-Handbuch (kvar lingvoj, sen Esperanto).

**adresloko** (T. place of destination, lieu de destination, Ankunftsort). La loko, al kiu poŝtaĵo estas adresita.

**aferpaperoj** (commercial papers, papiers d'affaires, Handelsakten). Dokumentoj ne havantaj la karakteron de nuna kaj persona korespondo, ekz.: aktoj, manuskriptoj, malnovaj leteroj: ili konsistigas specialan fakon de la poŝto internacia.

**afrankŝulda marko** (postage due stamp, timbre taxe, Nachportomarke). Speciala marko alfiksata al poŝtaĵo en la poŝto por signi, ke la poŝtaĵo estas tute ne aŭ nesufiĉe afrankita, indikante samtempe sumon kolektotan ĉe la adresato antaŭ ol transdoni al li la poŝtaĵon.

**akcesoraĵoj** (accessories, accessoires, Hilfsmittel). Diversaj objektoj uzataj de la filatelistoj ĉe studado kaj konservado de poŝtmarkoj aŭ aliaj afrankiloj (ekz. ĉarniroj, albumoj, teniloj, truetmezuriloj, filigraniloj ktp.).

**amaranta** (V. amaranth, amaranthe, purpurisch). Purpurema, havanta la koloron de purpura amaranto.

**ambaŭflanke presita** (printed on both sides, imprimé recto et verso, doppelseitiger Druck). Kvalifikas markon, kies bildo pro eraro presiĝis sur ambaŭ flankoj de la papero.

**anilina** (BDKRV. aniline, aniline, anilin-). Kvalifikas farbojn (ordinare malvo- aŭ karminnuancajn) tre solveblajn, faritajn aŭ el anilino mem aŭ el aliaj substancoj.

**ankro kun kablo** (foul anchor, ancre et cable, Anker mit Tau). Memkomprenebla.

**antaŭstampita** (precancelled, préalablement oblitéré, vorausentwertet). (Marko,) kiu portas nuligstampon antaŭ ol vendiĝi, por faciligi al la poŝtistoj traktadon al la multenombraj poŝtaĵoj de granda firmo aŭ korporacio.

**ardez(kolor)a** (slate, ardoise, schiefergrau). Memkomprenebla.

**arkforma ruledo** *(scalloped perforation, percé en arc, bogenförmige Durchstechung). Ruledspeco, ĉe kiu la entranĉoj prezentas serion da duonrondetoj, kiuj ne tute intertuŝiĝas je la finoj de la kurboj. Post disigo de du markoj **arkforme ruleditaj** unu prezentas randon kun rondaj elstaraĵoj, dum la dua prezentas konforme rondajn konkavaĵojn.

**armea marko** (military stamp, timbre de franchise militaire, Soldatenbriefmarke). Speciala marko (ordinare surpresita) por afranki leterojn de armeanoj.



**aŭtentika** (authentic, authentique, authentisch). Efektive eldonita de registaro, ne fantazia.

**baŭdruĉo** (BFF, LGMVW. gold-beaters' skin, baudruche, Ölpapier). Travidebla ledeca papero uzita por presi la du markojn de la eldono de Prusujo de 1866.

**bildo** (design, dessin, Zeichnung). La videbla prezentaĵo sur afrankilo, ekster la koloroj.

**bildflanke** (on front, recto, Bildseite). Sur sama flanko (de marko aŭ alia afrankilo) kiel la bildo.

**bildŝanĝo, nova bildo** (change of design, changement de dessin, neue Zeichnung). Memkomprenebla.

**bistra** (BKV. bistre, bistre, russ-schwarzbraun). Nigrebruna, havanta la koloron de farbo farita el fulgo.

**blanka fono** (colourless background, fond blanc, weisser Grund). Memkomprenebla, se oni scias la sencon de la substantivo.

**blankpresaĵo** (albino, imprimé en blanc, Blinddruck). Reliefa presaĵo tute senkolora.

**blazono** ([1] arms, armoires, Wappen). Simbola signo de regno, de urbo, de kompanio, Kp. K.

**bone centrita** (well centred, bien centré, wohlgezähnt). (Marko,) kies bildo sidas) ĝuste meze inter la ĉiuflanka truetaro.

**bonfara marko** (charity stamp, timbre de bienfaisance, Wohltätigkeitsmarke). Poŝtmarko, parto el kies vendoprezo estas asignita al iu speco de almozo aŭ bonfarado.

**brungriza** (drab, bistre-gris, braungrau). Memkomprenebla.

**busto** (bust, buste, Brustbild). Bildo prezentanta nur la kapon kaj bruston de persono, sen brakoj. Kp. K.

**cifero** (numeral, chiffre, Ziffer). Signo por skribi nombrojn. K.

**cinabra** (vermilion, vermilion, gelbrot). Havanta la helruĝan koloron de ruĝa hidrarga sulfido.

**cinam(kolor)a** (cinnamon, canelle, zimtbraun). Havanta la koloron de cinamo.

**ĉarniro** (hinge, charnière, Klebefalz). Peceto da gumita, fortika sed tre maldika papero, uzata por fiksi poŝtmarkon en albumon aŭ alian konservujon.

**ĉefplato** (head-plate aŭ key-plate, planche principale, Hauptplatte). Ĉe markoj dukoloraj oni uzas du platojn: tiun, kiu portas la ĉefan, plej ofte la centran, parton de la bildo, oni nomas **ĉefplato.**

**ĉeriz(kolor)a** (cherry red, cérise, kirschrot). Havanta la koloron de ĉerizo.

**ĉokolada** (chocolate, chocolat, schokoladenbraun). Havanta la koloron de ĉokolado.

**definitiva eldono** (regular issue, émission définitive, endgültige Ausgabe). Eldono da afrankiloj destinita por daŭra uzado, malprovizora.

**delikata truetaro** (fine perforation, fine dentelure, feine Zähnung). Truetaro konsistanta el malgrandaj truetoj tre interproksimaj.

**densaj** (close together, rapproché, eng zusammen). Tre interproksimaj (pri linioj ktp.).

**depago** (Z. fee, taxe, Gebühr). Speciala kosto de la poŝta servo.

**diant(kolor)a** (pink, rose rouge, nelkenfarbig). Havanta la palruĝan koloron de dianto.

**dimanĉa marko** (sabattical stamp, timbre dominical, Sonntagsmarke). Marko kies uzo admonas ne liveri la poŝtajon dimanĉe. Tiaj estis la belgaj markoj de 1893–1915 kun specialaj tiucelaj etikedoj. Por ebligi liveradon dimanĉe, oni devis deŝiri de la markoj la etikedojn.

**distrikta marko** (carrier's stamp, timbre de distribution, Zustellungsmarke). Unu el kategorio da Usonaj markoj, eldonitaj depost 1842 ĝis ĉirkaŭ 1861, por loka poŝto tra la distriktoj de diversaj poŝtoficejoj. Unue privataj, tiuj poŝtoj en 1851 iĝis sub regadon de la poŝto nacia.

**dors(flank)o** (back aŭ reverse, dos, en revers aŭ verso, Rückseite). Posta parto de objekto, K. 2. La gumflanko de marko aŭ koverto, la komunikflanko de poŝtkarto.

**duliniaj ciferoj** (double-lined numerals, chiffres à duoble trait, grosse Wertziffern). Ciferoj, kies konturo konsistas el po du paralelaj linioj.

**dumezura truetaro** (compound perforation, piquage varié, zweierlei Zähnung). Truetaro, kies mezuro vertikale diferencas de ĝia mezuro horizontale.

**duobla poŝtkarto** (reply postal card, carte postale avec réponse payée, Postkarte mit bezahlter Antwort). Paro da poŝtkartoj kunestantaj je unu rando, el kiuj unu karto portas komunikon, respondeblan afrankite per skribado sur la dua karto (oni forŝiras, surskribas kaj resendas ĉi tiun).

**duobla preso** (double impression, imprimé à double, Doppeldruck) Afrankilo, kies bildo pro eraro presiĝis dufoje, kun la dua preso ne ĝuste samloka kun la unua.



**duonrenversita filigrano** (watermark sideways, filagramme couché, liegendes Wasserzeichen). Filigrano, kiu vidiĝas kun la flankoj supre kaj malsupre, en marko rigardata en normala pozicio.

**duplikato** (BKV. duplicate, double, Doublette). Dua ekzemplero de sama markospeco. Kp. K.

**eburkapo** (ivory head, tête d'ivoire, Elfenbeinkopf). Kelkaj el la unuaj markoj de Granda Britujo estas troveblaj kun papero dorse tre bluita, esceptinte ĉe la portreto de la reĝino Victoria: tiajn markojn oni nomas **eburkapoj.**

**-eg-** (deep, foncé, tief). Intensa (pri koloroj). Ekz. **sukcenega** deep amber, ambre foncé, tief bernsteinfarbig), intense sukcenkolora ; **rozega** (deep rose, rose foncé, tief rosa), intense rozkolora.

**egaldika papero** (wove paper, papier uni, einfaches Papier). Papero egale dika en ĉiu parto, sen lumstrekoj, ne vergita.

**ejo de nelivereblaj poŝtaĵoj** (dead-letter office, bureau des rebuts, Ausschuss für unbestellte Sendungen). Fakloko de la poŝto, kien oni sendas nelivereblajn poŝtaĵojn, por ilin malfermi kaj aŭ resendi al la adresinto aŭ konservi en muzeo aŭ detrui.

**eksigita** (F. K. p. 313), **ekster kurso, eksterkursa** (demonetised, hors cours, ausser Kurs). (Afrankilo) laŭ dekreto ne plu uzebla en la poŝto.

**ekzemplero** (specimen aŭ copy, exemplaire, Exemplar). Unu afrankilo el aro da samspecaj. Kp. K.

**eldono** (issue, émission, Ausgabe). Aro da markoj aŭ aliaj afrankiloj je unu fojo elmetitaj de registaro por poŝta uzado.

**elektofolio** (approval sheet, feuille à choix, Auswahlgoben). Folio kun surfiksitaj markoj, sendata al filatelisto, por ke li elektu el ĝi markojn laŭplaĉe, por aĉeti aŭ interŝanĝi.

**elektosendaĵo** (approval selection, envoi à choix, Auswahlsendung). Aro da markoj sendata de markkomercisto, por ke kolektanto aĉetu el ili, kion li deziras, kaj resendu ceterajn.

**eluzita plato** (worn plate, planche usée, abgenutzte Platte). Plato, sur kiu partoj de la bildo tiel eluziĝis, ke ili jam ne klare presas.

**emajla papero** (enamelled paper, papier emaillé, Emaillepapier). Speco de tre glacea papero, ekz. ĉe la 4 p. markoj de 1855–56 de Granda Britujo aŭ la unuaj ½ p. markoj de Cejlono.

**emblemoj blazonartaj** (heraldic emblems, fleurs héraldiques, Sinnbilder). Emblemoj, kiajn oni trovas sur blazonoj.

**en kurso, enkursa** (L. current, en cours, kursierend). (Afrankilo) nun poŝte uzata.

**eraraĵo** (error, erreur, Abart [Fehldruck, -farbe, -zähnung, usw.]). Afrankilo enhavanta ian eraron (de preso, koloro, filigrano aŭ alia).

**-et-** (Z. -ish, -âtre, -lich). Iom (pri koloroj). Ekz. **blueta** (bluish, bleuâtre, bläulich), iom blua ; **bruneta** (brownish, brunâtre, bräunlich), iom bruna.

**etikedo** (V. label, talon, Anhängsel). Papereto kun presita, stampita aŭ skribita noto alfiksenda sur ion.

**fabrikfiligrano** (maker's watermark, marque de fabrique, Fabrikwasserzeichen). Filigrano ne de la poŝto sed de la fabrikinto de la papero.

**falsaĵo, falsa marko** (counterfeit, timbre faux, Fälschung aŭ gefälschte Marke). Imitaĵo de poŝtmarko aŭ alia afrankilo, fabrikita por trompi.

**fantazia** (bogus, de fantaisie, Fantasie-). Kvalifikas pretendatan afrankilon, kiu neniam rajte ekzistis.

**filatelo** (BGKMW. [²] philately, philatélie, Philatelie). Arto kaj scienco kolekti la poŝtmarkojn kaj aliajn afrankilojn kaj studi ilin kaj ilian historion.

**filatela** (philatelic, philatélique, philatelisch). Rilata al la filatelo.

**filatelisto** (philatelist, philatéliste, Philatelist). Specialisto en la filatelo, kolektanto de poŝtmarkoj.

**filigrano** (V. watermark, filagramme aŭ filigrane, Wasserzeichen). Bildo, literoj aŭ ciferoj formitaj en la papero kaj videblaj tralume. Kp. K.

**filigran(serĉ)ilo** (watermark detector, filigranoscope, Wasserzeichensucher). Malprofunda tasceto kun nigrega fundo, sur kiun oni metas markon kaj saturas per benzino, por videbligi la filigranon.

**fiska**—vd. **imposta.**

**flanko ĉe flanko** (se tenant, se tenant, nebeneinander). Kvalifikas paron da markoj malsamaj (je valoro, bildo, surpreso ktp.) kunestantaj, kune presite sur unu sama markofolio.

**flavbruna** (fawn colour, fauve, hellbraun, falb aŭ fahlbraun). Memkomprenebla.



**folio** (sheet, feuille, Blatt). Paperpeco, sur kiun oni presis per markoplato ; aro da nedisigitaj markoj kiel presita per plato.

**folia filigrano** (watermark in the sheet, filigrane dans la feuille, Bogenwasserzeichen). Filigrano kovranta tutan markofolion aŭ grandan parton de ĝi.

**foliero** (pane, panneau, Gruppe). Sekcio de markofolio disigita de aliaj sekcioj per marĝeno pli larĝa ol inter la apartaj markoj.

**foliopa truetado** (harrow perforation, piquage de toute la feuille, Bogenzähnung). Proceda trueti markojn per maŝino, kiu truetas tutan folion aŭ almenaŭ folieron da markoj per unu fojo.

**fono** (Z. Far. background, fond, Untergrund aŭ Hintergrund). Posta parto de bilda prezentaĵo.

**formato, grando** (D. size, grandeur aŭ format, Grösse aŭ Format). Dimensioj, fizika amplekso.

**formo** (shape, format, Format). Geometria aspekto (de marko). K. 2.

**forskrapita** (erased, biffé, durchstrichen). Forigita per skrapado (pri parto de bildo aŭ surskribo ktp.).

**framboruĝa** (raspberry red, rose framboise, himbeerrot). Havanta la koloron de ruĝa frambo.

**freŝa** (mint, neuf avec gomme, postfrisch). (Afrankilo) en la stato, kiel ĝi eliris el la farejo.

**frigia** (W.) **ĉapo** (liberty cap, bonnet phrygien, phrygische Mütze). Malvasta konusa ĉapo ; prae la Roma "pileus", ĉapo donita al liberigita sklavo ; poste metita konvencie sur la kapon de statuoj de la diino de libereco, aŭ sur stangon. La adjektivoj "phrygien, phrygische" (Frigia) devenas de tio, ke la konusa formo de la ĉapo similas al katolika tiaro nomita "pileus phrygius" aŭ "phrygium". La frigia ĉapo en filatelo aperas sur la markoj aŭ kiel filigranoj de kelkaj Mez- aŭ Sud-Amerikaj regnoj.

**fronto** (front, front, Vorderseite). Antaŭa parto de bilda prezentaĵo, malo de fono.

**gazetmarko**—vd. **ĵurnalmarko.**

**germanaj (pres)literoj** (Gothic type, lettres gothiques, Fraktur). Presliteroj kiel ĉe malnova germana presaĵo.

**giĉeto** (BV. stamp-window, guichet, Schalter). Fenestreto en vando en poŝtoficejo, tra kiu la publiko faras poŝtajn negocojn.

**giloŝa** (V.) **fono** (figured background, fond guilloché, gemusterter Hintergrund). Ornama fono, konsistanta el strekoj rektaj aŭ kurbaj, kiuj interplektiĝas.

**glacea** (V.) **papero** (glazed paper, papier glacé, Glanzpapier). Papero kun surfaco polurita kaj brilanta.

**glata papero** (K. smooth paper, papier satiné, glattes Papier). Papero, kies partoj ne superstaras unu alian, sur kiu oni povas libere konduki la manon.

**globo (insigna)** (orb, globe, Reichsapfel). Sfero havanta krucon, grava parto de la brita reĝa insignaro. Ĝi aperas en filatelo kiel filigrano en iuj anglaj markoj.

**grando**—vd. **formato.**

**grenata** (BV. garnet, grenat, granatrot). Havanta la malhelruĝan koloran de juvelŝtono, vario de korindo.

**gumhava** (adhesive, mobile, aufklebbar). Kvalifikas poŝtmarkon alfikseblan per gumo sur poŝtajon.

**gumhavaĵo**—marko tiela.

**ĝisgenua** (half-length, jusqu'aux genoux, Knie[stück]). (Portreto) prezentanta homan figuron ĝis la genuoj.

**haĉ(aĵ)o** (V. shading, hachures, Schraffierung). Aro da tre interproksimaj paralelaj linioj por figuri ombrojn aŭ tranĉaĵojn. Kp. V.

**haŭtkolora** (flesh colour, chair, fleischfarben). Havanta la koloron de "blankula" haŭto.

**hela** (bright, vif, hell). Havanta multe da blanko, malforte kolorita. K. 2.

**helviola** (magenta, magenta, hellviolett). Memkomprenebla.

**imposta, fiska marko** (revenue aŭ fiscal stamp, timbre fiscal, Stempelmarke). Marko uzata por signi pagon de ia nerekta imposto.

**imposte, fiske uzita** (fiscally used, usé fiscalement, fiskalisch gebraucht). (Afrankilo) uzita por pagi imposton.

**impostopoŝta** (postal-fiscal, fiscal-postal, Stempelmarke als Freimarke gebraucht). Kvalifikas markon propre eldonitan nur por imposta uzado, tamen sankciitan kelktempe aŭ daŭre por poŝta uzado.

**indiga** (BK. indigo, indigo, indigo). Havanta la bluanuancon de indiga farbo.



**-it-** (-ed, -té, ge-). Tinkturita je ia koloro. Ekz. **bluita** (blued, bleuté, gebläut), blue tinkturita.

**ĵurnalmarko, gazetmarko** (newspaper stamp, timbre de journaux, Zeitungsmarke). Poŝtmarko por afranki ĵurnalon aŭ gazeton.

**kadro** (frame, cadre, Umrandung aŭ Umrahmung). Borderaĵo, ĉirkaŭanta la bildon de marko aŭ alia afrankilo.

**kanaba papero** (manila, papier manille, Hanfpapier). Nedelikata papero, farita el la fibroj de kanabo.

**kapzono** (F. L. fillet, bandeau, Stirnband). Zoneto ĉirkaŭ la haroj ĉe la frunto (ĉe figuroj alegoriaj).

**karmina** (carmine, carmin, karmin). Havanta la koloron de ruĝa farbo produktita el la koĉenilo. Kp. K.

**kartuŝo** (BV. tablet, cartouche, Schildchen). Ĉe afrankil-bildo, kvadrato aŭ rektangulo enhavanta surskribon aŭ valorciferon.

**kaŝtan(kolor)a** (chestnut, marron, kastanienbraun). Bruna kiel kaŝtano.

**klapo** (flap, patte, Klappe). Liberranda, ordinare gluhava parto de koverto, per kiu oni ĝi tiun fermas.

**klara** (clear, clair, klar). Kun ĉiuj detaloj facile videblaj.

**kliŝo** (cliché, cliché, Druckstock). Metala plato, sur kiu estas reproduktita la presota bildo. K. 2.

**kobaltblua** (cobalt blue, bleu de cobalt, kobaltblau). Havanta la koloron de blua farbo fabrikita el kobalto.

**kolora fono** (coloured background, fond de couleur, farbiger Grund). Fono havanta koloron.

**koloreta** (toned, teinté, getönt). Pri papero: tre malforte kolorita.

**kolorŝanĝo, nova koloro** (change of colour, changement de couleur, Farbenänderung). Memkomprenebla.

**kombila truetado** (comb perforation, piquage à la herse, Kammzähnung). Procedo trueti markojn per maŝino, kiu truetas per unu fojo tri flankojn de ĉiu marko en vico da markoj. La nomo venas de tio, ke la aranĝo de la truetipingloj havas la aspekton de kombilo.

**kompleze stampita** (cancelled-to-order, oblitéré de complaisance, mit Gefälligkeitsstempel). Nuligita ne en poŝta uzado sed nur por komplezi al filatelistoj.

**kompostita** (typeset, composé, gesetzt). Rilatas al marko presita per ordinaraj presliteroj.

**kontrollitero** (syllabic character, lettre syllabique, Kontrollbuchstabe). Ĉe l' unuaj eldonoj de Japanujo, eta litero en la bildo servanta por distingigi la diversajn platojn (analogie je la platnumeroj de aliaj landoj).

**kontrolsigno** (control mark, marque de contrôle, Kontrollzeichen). Signo (ordinare cifero aŭ nomo) stampita aŭ presita sur marko aŭ alia afrankilo, por kontroli ĉi ties devenlokon, eventuale de ŝtelo aŭ alia misuzo.

**kradetaĵo** (grill, grill, Waffel aŭ Gauffrage). Reliefajeto, konsistanta el kvadrataj piramidetoj en paralelaj vicoj, surstampita sur marko, por disrompi la paperfibrojn, por ke la inko de nuligstampo ensorbiĝu en la paperon kaj difektogardu la markon kontraŭ dufoja poŝtuzo.

**kretpapero** (chalky paper, papier crayeux, Kreidepapier). Speco de glacea papero uzita moderne por multaj markoj de Granda Britujo kaj ĝiaj kolonioj. La polurita surfaco ja pli ofte venas ne de kreto, sed de bariosulfato.

**kromflava** (**krom-** BKV. chrome yellow, jaune de chrome, chromgelb). Hele flava, kiel ĉe ia kombinaĵo de kromo.

**kromvaloro** (supplementary value, valeur supplémentaire, Ergänzungswert). Ĉe bonfaraj markoj, valoro aparte presita aŭ surpresita, kiu indikas la specialan sumon el la vendoprezo de la marko dediĉitan al la bonfarado.

**kruda truetaro** (coarse perforation, dentelure grossière, grobe Zähnung). Truetaro konsistanta el truetoj grandaj kaj nedensaj.

**kubierto** *(insured letter stamp, vignette de recommandation, Geldbriefversicherungsschien, hispane **cubierta**). Unu el grandaj markoj uzataj en Kolombio kaj ĝiaj ŝtatoj por signi asekuron de leteroj enhavantaj monon.

**kuprogravuro** (line-engraving, taille douce, Kupferdruck). La procedo gravuri sur kuproplatoj, la unua metodo presi poŝtmarkojn.

**kvadrate eltranĉita** (cut square, découpé en carré, quadratisch ausgeschnitten). Rilatas al la procedo, eltranĉi la bildon sur poŝtkoverto, poŝtkarto, banderolo aŭ leterkarto, kun marĝenoj en formo de kvadrato. Jen la ordinara maniero tiajn kolekti, se oni ne deziras konservi la tutan afrankilon.

**kvadrataĵo** (cut square, découpure, Quadratausschnitt). Tia eltranĉaĵo.



**kvadrate striita** (laid in squares, carré, quadratisch gerippt). (Papero) havanta diafanajn strekojn interkruciĝe formantaj kvadratojn.

**(kvadrat) kvaro** (block of four, bloc, Block). Kvaro da nedisigitaj markoj en formo de kvadrato.

**kvaronluno** (crescent, croissant, Halbmond). Luno ĉe sia unua fazo : ofta simbolo ĉe la ŝtatoj Mahometanaj, aperanta kaj sur markobildoj kaj en filigranoj.

**lakstrioj** (shiny bars, lignes brillantes, Lackstreifen). De 1900 ĝis 1905 la markoj de Aŭstrujo portis fronte striojn el la brila palbruna lako, por malhelpi forigon de la nuligstampoj.

**laklozanĝoj** similspecaj uziĝis en Rusujo de 1909–1918.

**latinaj (pres)literoj** (roman type, romain, Antiqua). La presliteroj uzataj ĉe ordinaraj presaĵoj (ĵurnaloj, revuoj, libroj k.s.).

**lazura** (azure, azur, himmelblau). Havanta la koloron de la ĉielo. K.

**leterkarto** (letter card, carte-lettre, Kartenbrief). Karto sufiĉe granda por surkribi leteron.

**liniita papero** (ruled paper, papier ligné, liniiertes Papier). Papero surhavanta paralelajn liniojn.

**liniopa truetado** (guillotine perforation, piquage en lignes, Linienzähnung). Procedo trueti markojn, per kiu unu sola flanko de vico da markoj truetiĝas per unu fojo.

**litografado** (lithography, lithographie, Steindruck). Procedo, per kiu oni prese reproduktas desegnaĵon, skribaĵon k. c., faritan sur speciala ŝtono. V.

**liveri**—vd. **transdoni.**

**loka** (local, local, lokal). Apartenanta al unu loko, ne transpasanta la limojn de unu loko. K.

**loka preso** (local print, impression locale, Lokaldruck). Preso (de afrankiloj) en la ŝtato mem, kie ili disvendiĝas.

**lokaj markoj** (local stamps, timbres locaux, Lokalmarken). Markoj eldonitaj de privata kompanio, korporacio aŭ individuo por afranki interne de limigita teritorio.

**lozanĝoj** (V. lozenges, losanges, Rauten). Linioj interkruciĝe formantaj serion da paralelogramoj, kies ĉiuj lateroj estas egalaj. Kp. V.

**makulaturo** (BKV. printers' waste, maculature, [Druck]-ausschuss). Presaĵo makulita, difektita, ne taŭga siacele. Kp. K.

**malbrila** (dull, terne, stumpf aŭ matt). Ne klare kolorita.

**maldense striita** (laid in wide lines, bâtonné, in breiten Linien gerippt). (Papero) havanta diafanajn strekojn ne proksimajn inter si.

**maldikega papero** (pelure paper, papier pelure, sehr dünnes Papier). Memkomprenebla.

**malfrumarko** (too late stamp, timbre pour lettres en retard, Nachzahlungsmarke). Marko indikanta specialan pagon por aldoni poŝtajon al iu poŝto post la ĝusta horo.

**malhela** (dark, foncé, dunkel). Havanta malmulte da blanko, forte kolorita. K. Ekz. **malhele blua.**

**malneta** (V. smudgy, sâle, schmutzig). Kvalifikas preson ne precize videblan en ĉiuj detaloj pro trosterniĝo de la presinko.

**malta kruco** (Maltese cross, croix de Malte, Maltheserkreuz). Formo de kruco, kiu devenis de la mezepokaj kavaliroj de Malto. Ĝi montriĝas en la markoj de Malto.

**malva** (mauve, mauve, malven). Havanta la delikatan purpur-nuancon de malvofloro.

**mankohava** (defective, defectueux, mangelhaft). Havanta mankon aŭ mankojn, ne perfekta (ordinare pri stato de marko aŭ alia afrankilo).

**mank(o)listo** (want list, mancoliste, Fehlliste). Listo de markoj mankantaj kaj dezirataj ĉe ies kolekto.

**manskriba** (manuscript, manuscrit, handschriftlich). Surskribita (sur marko) per mano, ekz. por ŝanĝi la nominalan valoron ĉe surstampo.

**manstampilo** (hand stamp, timbre à main, Handstempel). Stampilo, kiun oni mane uzas.

**markfarejo** (mint [place], monnaie [lieu], Münze [Haus]). Ejo, kie oni fabrikas afrankilojn.

**markkajereto** (booklet of stamps [as issued by post office], carnet de timbres, Markenheft). Kajereto, kies folioj konsistas alterne el markaroj (ses-ok markoj) kaj oleeca papero, malebliganta intergluiĝon de la markoj.



**markrulo** (coil of stamps, rouleau de timbres, Markenrolle). Rulo da markoj, truetitaj aŭ horizontale aŭ vertikale, por uzado en afrankil- aŭ markovendaj maŝinoj.

**marverda** (sea green, vert glauque, seegrün). Havanta la koloron de verda maro.

**maŝoj** (loops, boucles, Schlingen). Linio aŭ serio da linioj, kiu aŭ ĉiu el kiuj kurbiĝe krucadas sin ripete, lasante elipseman spacon interne de ĉiu kurbiĝo. Tia filigrano aperas en kelkaj markoj de Hispanujo kaj kolonioj.

**memoriga marko** (commemorative stamp, timbre commemoratif, Erinnerungsmarke). Marko speciale eldonita por festi memorindan daton en la historio de ŝtato.

**mezbonstata ekzemplero** (average specimen, exemplaire ordinaire, Durchschnittsexemplar). Unu afrankilo en stato nek tute bona nek tute malbona.

**mezgranda** (medium, moyen, mittleres). Nek granda nek mal-granda.

**miksaĵo** (mixture, mélange, Mischung). Paketo da miksitaj markoj kun duplikatoj.

**minusklo** (V. lower-case letter aŭ small letter, petite lettre, kleiner Buchstabe aŭ kleine Schrift). Unu el ordinara literaro, ne ĉeflitero (majusklo).

**mirta** (myrtle, vert russe, russischgrün). Havanta la grizverdan nuancon de mirta folio.

**muskoverda** (moss green, vert mousse, moosgrüm). Havanta la verdan nuancon de musko.

**nedaŭra koloro** (fugitive colour, couleur délicat, empfindliche Farbe). Koloro, kiu facile ŝanĝiĝas aŭ malaperas ĉe akvo aŭ atmosfero.

**nedisigita** (unsevered, non séparé, zusammenhängend). Ordinare pri paro da markoj ne distonditaj nek disŝiritaj unu de la dua.

**neregula truetaro** (irregular perforation, dentelure irrégulière, unregelmässige Zähnung). Truetaro, kies truetoj troviĝas je nesamaj distancoj inter si.

**neta** (V.) **truetaro** (clean-cut perforation, dentelure exacte, deutliche [scharfe] Zähnung). Truetaro konsistanta el truetoj ebenrandaj, akre difinitaj.

**nominala valoro** (K. face value, valeur nominale, Nennwert). Valoro presita sur afrankilo kaj ofte diferenca de la efektiva valoro. Kp. K.

**nuanco** (shade, nuance, Abtönung aŭ Schattierung). Malgranda, apenaŭ sentebla kolora diferenco ĉe afrankiloj. Kp. K.

**nuancaĵo**—marko kun malgranda kolordiferenco (kompare kun alia marko, cetere identa).

**nuligi** ([3] to cancel, oblitérer, entwerten). Fari afrankilon senvalora por enpoŝta uzado, ordinare per apliko de speciala stampilo, nur en esceptaj okazoj per streko de plumo. (La impostomarkoj, kontraŭe, estas nuligataj ordinare per plumstrekoj aŭ skriboj).

**oblikva** (slanting, en biais aŭ oblique, schräg). Flankiranta, kliniĝanta de la horizontala aŭ vertikala direkto. K.

**oblongo** (BF. LM. oblong, oblong, Querrechteck). Rektangulo pli longa horizontale ol vertikale.

**odontometro**—vd. **truetmezurilo.**

**oficiala fermilo** (official seal, timbre de retour, Verschlussmarke). Glumarko enpoŝte uzata por fermi poŝtokovrajon erare malfermitan aŭ difektitan dum transiro.

**oficiala marko** (official stamp, timbre official, Dienstmarke). Marko uzata ne en la publika poŝto, sed nur de la oficistoj de registaro.

**ofsetpreso** * (off-set printing, impression en offset, Gummidruck). Speciala fotografa procedo uzita por presi kelkajn Usonajn valorgradojn dum la Mondomilito.

**okra** (BK. Ochre, ocre, Ocker). Havanta la flavan nuancon de farbo minerala, konsistanta grandaparte el ferhidroksido. Kp. K.

**ondolinioj** (wavy lines, ondulations, Wellenlinien). Serio da linioj en formo de ondoj. Ili aperas ordinare kiel filigrano.

**onduma ruledo**—vd. **serpentuma ruledo.**

**originalo** (original, timbre original, Original). Marko efektive eldonita de registaro por poŝta uzado, ne represaĵo.

**ovalo horizontala** (horizontal oval, ovale couché, Quereirund). Ovalo, kies pli longa akso iras horizontale.

**ovalo vertikala** (upright oval,ovale vertical, Hocheirund). Ovalo, kies pli longa akso iras vertikale.



**ovoflava** (yolk coloured, jaune d'oeuf, dottergelb). Havanta la koloron de ovoflavo.

**pakaĵpoŝto** (parcels post, colis postaux, Paketpost). Branĉo de la poŝta servo, kiu zorgas pri sendado de pakaĵoj.

**paketo** (D. packet [of stamps], paquet [de timbres], Paket [Briefmarken-]). Aro da afrankiloj ope vendata de markkomercisto.

**(paper)pasto** (pulp, pâte, Papiermasse). Fluida maso el fibroj tolaj, katunaj, pajlaj, lignaj, herbaj k.t.p., el kiu oni faras paperon.

**parafo** (paraphe, paraphe, Namenszug). Subskribo kun aldonitaj ornamaj strekoj. Kp. V. Tiamaniere certaj markeldonoj de Kubo estis disingigitaj por uzado en Porto-Riko.

**perlogriza** (pearl grey, gris, perlgrau). Havanta palgrizan nuancon de perlo.

**piedo** ([4] paw, patte, Pfote aŭ Kralle). Malsupra parto de unu el la specialaj ir-membroj de ia ajn besto.

**pizverda** (pea green, vert printanier, maigrün). Havanta la delikatan verdonuancon de pizoj.

**plato** (Kp. V. plate, planche, Platte). Metalpeco portanta gravuraĵon por prestransigi sur paperon. Ĉe markopresado ĝi konsistas ordinare el aro da kliŝoj sambildaj, pres-produktontaj folion da markoj.

**platnumero** (plate number, numéro de planche, Plattennummer). Seria numero de plato, kiu aperas aŭ sur la markoj mem (kiel ĉe kelkaj eldonoj de Granda Britujo) aŭ sur la marĝeno de markofolio (kiel ĉe la Usonaj markoj).

**plenvizaĝo** (full face, effigie de face, Vollgesicht). (Ĉe portreto) vizaĝo rigardanta rekte antaŭen.

**plikariĝo** (rise [in price], élévation, Erhöhung). Pliiĝo ĉe la filatela valoro de afrankilo.

**plumnuligo** (pen cancellation, oblitération en plume, Federstrichentwertung). Siacela senvalorigo de marko per streko de plumo.

**por(oz)a** (V.) **papero** (porous paper, papier poreux, poröses Papier). Papero, kiu havas multajn porojn, tra kiuj likvaĵo povas flui. V.

**postuli** (to call for, demander, abfordern). Sin prezenti ĉe poŝtogiĉeto por ricevi poŝtaĵojn.

**poŝta tarifo** (postage rates, port, Portosatz). Tabelo de pagoj por la poŝto. Kp. K.

**poŝte restante** (K. general delivery, poste restante, postlagernd). Surskribo sur letero aŭ alia poŝtajo, por montri, ke ĝi estas liverota al la adresato en la poŝta oficejo. K.

**poŝtestraj markoj** (postmasters' provisionals, emissions des maîtres de postes, Stadtpostmarken). Provizoraj poŝtmarkoj eldonitaj de diversaj Usonaj poŝtestroj antaŭ apero de la naciaj markoj.

**poŝte uzita** (postally used, oblitéré par la poste, postalisch gebraucht). (Afrankilo) uzita en la poŝto.

**poŝtkarto** (postal aŭ post card, carte postale, Postkarte). Karto poŝte uzata por sendi nelongajn negravajn komunikojn.

**poŝtkorno** (post horn, cor de poste, Posthorn). Muzika korno iam uzita de la poŝtoportistoj, precipe ĉe la poŝtaj diliĝencoj, por anonci alvenon aŭ foriron de la poŝto. Ĝi aperas en la bildo aŭ en la filigranoj de multaj markoj.

**poŝtmandato** (B. kp. K. money or postal order, mandat poste, Postanweisung aŭ Geldanweisung). Poŝta dokumento ordonanta pagi iun sumon da mono al montrita persono. Kp. K.

**poŝtmarko** (postage stamp, timbre-poste, Brief- aŭ Freimarke). Signo algluenda al poŝtajo por afranki ĝin.

**poŝtoficejo** (B. post office, bureau de poste, Postamt). Loko por ricevadi kaj ekspedadi poŝtajojn.

**poŝtostampi** (to postmark, oblitérer, stempeln). Stampi (afrankilon) en la poŝto per speciala stampilo, por senvalorigi ĝin kontraŭ duafoja enpoŝta uzado.

**prakliŝo** (die, coin, Urstempel). La originala kliŝo, laŭ kiu oni fabrikas aron da kliŝoj konsistigantan markoplaton.

**(pri) tondita** (trimmed, coupé, beschnitten). Kvalifikas markon, de kiu oni fortondis la truetar-marĝenon.

**(pres) provaĵo** (BK. proof, épreuve, Probedruck). Prova presaĵo (de afrankilo), aŭ el prakliŝo aŭ plato, kompleta aŭ nekompleta, por korekti preserarojn.

**progresinta** (advanced, avancé, angehend). (Filatelisto) havanta grandan kolekton.

**provaĵo, esajo** * (essay, essai, Essay). Markobildo proponita sed ne oficiale enuzigita.



**provizora eldono** (provisional issue, émission provisoire, provisorische [vorläufige] Ausgabe). Eldono da afrankiloj destinita por nelongedaŭra uzo kaj anstataŭota per definitiva. Kp. K.

**prusblua** (V. Prussian blue, bleu de Prusse, preussischblau). Malhelblua, kiel farbo el ferocianido.

**punca** (crimson, ponceau, ponceau). Kvalifikas aparte riĉan ruĝegnuancon, iomete purpuran.

**punkt(it)a** (dotted, sablé, punktiert). Konsistanta el presitaj (aŭ stampitaj) punktoj.

**punkta klapo** (pointed flap, patte pointue, gespitzte Klappe). Klapo (de koverto), kies rando estas triangula, finiĝanta per punkto.

**punkta ruledo** * (pin perforation, percé en pointes, punktförmige Durchstechung). Ruledspeco, per kiu la ruledilo trapikas la paperon je egalaj interspacoj, sed forigas neniom da papero.

**randaĵo** (Mar. border, bordure, Rand). Presita kadro enfermanta bildon aŭ parton de bildo sur marko aŭ alia afrankilo.

**rapidiga marko** (special delivery stamp, timbre pour lettres par exprès, Eilmarke). Speciala marko signanta la krompagon ĉe la rapidpoŝto.

**rapidpoŝto** (special delivery, exprès, Eilpost). Branĉo de la poŝto, kiu kontraŭ speciala pago entreprenas transdoni poŝtajon per speciala sendato antaŭ la regula transdonado.

**rekomendi** (B. F. K. p. 217. to register, recommander, einschreiben). Poŝte asekuri poŝtajon, kontraŭ speciala krompago.

**rekomendmarko** (registered letter stamp, timbre pour lettres recommandées, Einschreibemarke). Speciala marko por signi, ke oni faris la rekomendpagon kaj ke la poŝtaĵo estas rekomendita.

**rektangule striita** (laid in rectangles, quadrillé, rechtwinkelig gerippt). (Papero) havanta diafanajn strekojn interkruciĝe formantaj rektangulojn.

**rektangulo** (R. rectangle, rectangle, Rechteck). Kvarlatera ebena figuro, entenanta kvar angulojn po 90 gradoj.

**reliefa** (embossed, en relief, geprägt). Tiel presita, ke ĝi klare superstaras la fonon. Kp. K.

**remburso** (T. reimbursement, remboursement, Nachnahmebetrag). Monsumo pagata de la poŝto kontraŭ perdo de poŝtaĵo rekomendita.

**renversita** (inverted, renversé, verkehrt aŭ kopfstehend). Kun la normala supro malsupre kaj la normala malsupro supre.

**renversita centraĵo** (inverted centre, dessin aŭ central renversé, verkehrtes Mittelstück). Ĉe dukoloraj markoj, la centra bildo renversita rilate al la kadro.

**represaĵo** (reprint, réimpression aŭ timbre réimprimé, Neudruck). Presaĵo farita el originala plato, lignobloko aŭ ŝtono, el kiu aŭtentikaj poŝtmarkoj presiĝis, sed farita post elkursigo de la markoj ; do ne por poŝta uzado, sed nur kiel specimeno vendota al filatelistoj.

**resendmarko** (return letter stamp, timbre pour lettres en retour, Rückbriefmarke). Etikedo alfiksata al poŝtajo neliverebla, por signi, ke la poŝtajo estu resendata al la adresinto. Tiaj markoj uziĝis en Norvegujo kaj Bavarujo. La tiaj markoj de Bavarujo formis ankaŭ sigelojn por la poŝte malfermitaj leteroj.

**respondkupono** (reply coupon, coupon réponse, Antwortschein). Dokumenteto aĉetebla ĉe Universal-Poŝtligaj oficejoj, kiu rajtigas ricevi kontraŭ ĝi en alia membrolando afrankilon valorantan minimuman afrankon de internacia letero.

**restaĵo(j)** (remainders, stock restant, Restbestände). Aro da afrankiloj restanta ĉe la poŝto post elkursigo de tio sama. Oni tiam aŭ detruas ilin aŭ vendas al markkomercistoj.

**retaĵo** (BV. network, burelage, Netzwerk). Presaĵo(aŭ stampaĵo) prezentanta multe da interkruciĝantaj linioj en formo de reto.

**retaĵa** (with network, burelé, genetzt). Surhavanta presitan (aŭ stampitan) retaĵon, aŭ konsistanta el retaĵo (ekz. retaĵa fono).

**retuŝi** (V. to retouch, retoucher, nacharbeiten). Korekti la nekorektaĵojn de gravuraĵo. V.

**revenpoŝte** (by return mail, par retour de courrier, mit umgehender Post). Per la plej proksime alvenonta poŝto post sendo de poŝtaĵo.

**rezeda** (mignonette, réséda, reseda). Havanta la grizverdan nuancon de rezedo.

**ricevavizo** (return receipt, avis de reception, Rückschein). Karto aŭ alia dokumento oficiale sendata al sendinto de poŝtaĵo, por sciigi, ke la poŝtaĵo transdoniĝis al aŭ ĉe la adresato.

**ronda klapo** (rounded flap, patte recourbée, abgerundete Klappe). Klapo (de koverto), kies pinto estas rondita.

**rozbranĉeto** (spray of roses, tige de rose, Rosenzweig). Speco de filigrano sur markoj de Granda Britujo.



**roz(kolor)a** (rose, rose, rosa aŭ rosenfarbig). Delikate ruĝa.

**ruĝbruna** (russet brown, brun roux, rotbraun). Memkomprenebla.

**ruledo** *([5]) roulette, perçage, Durchstechung). Serio da tranĉetoj inter la vicoj de markoj en markofolio, por faciligi la disigon de la markoj. Ruledo diferencas de truetaro per tio, ke ĉe la unua procedo de entranĉo neniom da papero foriĝas, kiel ĉe truetaro. Verbo : **ruledi.** Participo : **ruledita. Ruledilo**—instrumento por ruledi.

**segildenta ruledo** * (sawtooth perforation, percé en scie, sägenartige Durchstechung). Ruledspeco, ĉe kiu la entranĉoj similas al segildentoj, formante etajn triangulojn.

**sekcita** (bisected, coupé en deux, halbiert). Disigita en du partojn. V.

**sekvigi** (T. to forward, réexpedir, nachsenden). Sendi poŝtaĵon al adreso alia ol la unue metita, ĉar la adresato lokŝanĝis.

**sen filigrano** (unwatermarked, sans filagramme, ohne Wasserzeichen). Memkomprenebla, se oni scias la sencon de la substantivo.

**senhaĉa fono** (solid background, fond uni, glatter Grund). Fono tute kolorita, sen haĉoj.

**senpaga afrankilo** (frank, port payé, Frankostempel). Subskribo aŭ alia signo, kiu liberigas kontraŭ afrankopago.

**senpunkta klapo** (blunt flap, patte non pointue, stumpfe Klappe). Kovertoklapo, kies rando ne finiĝas per punkto.

**senserifaj (pres)literoj** *(sans-serif type, lettres antiques, Blockschrift). Presliteroj sen **serifoj** (*) (ornamaj streketoj ĉe la finoj kaj anguloj de literoj, kiel ĉe ordinara presliteraro).

**sentrueta** (imperforate, non dentelé, ungazähnt aŭ ungeschnitten). Sen truetaro.

**sepia** (sepia, sépia, sepia). Havanta la malhele ruĝbrunan koloron de farbo farita el sekrecio de sepio.

**serio** (set, série, Satz). Aro da afrankiloj apartenanta al unu certa kategorio (ekz. unu eldono, unu epoko, unu lando ktp.).

**serpentuma ruledo** (serpentine perforation, percé en serpentine, schlangenartige Durchstechung). Ruledspeco, kies entranĉoj formas ondoforman linion. Ankaŭ **onduma** (wavy, endoyant, wellenförmig).

**signoj de la gravurinto** (engraver's marks, marques de graveur, Stecherzeichen). Etaj signoj, kiujn la gravuristoj iafoje faras sur kliŝoj por povi distingi siajn presaĵojn.

**silkaj fadenoj** (silk thread, fils de soie, Seidenfäden). Rilatas al papero, en kies ŝtofon oni enigis tiajn fadenojn.

**silkfibra papero** (granite paper, papier avec fragments de fils de soie, Faserpapier). Papero dense traplektita per silkaj fibroj.

**siringa** (lilac, lilas, lila). Havanta la delikatan purpurnuancon de siringofloro.

**siringobruna** (puce, puce, lilabraun). Siringokolora kun bruna kromnuanco.

**siringruĝa** (solferino, solferino, lilarot). Havanta la koloron de fuksino, ruĝa substanco koloriga, ricevita per oksidigo de miksaĵo de anilino kaj toluidino. V.

**skrapdifektaĵo** (abrasion, grattage, Schürfung). Difektaĵo sur afrankilo pro skrapiĝo.

**smeraldoverda** (emerald green, vert émeraude, smaragdgrün). Havanta la koloron de smeraldo.

**speco** (variety, variété, Abart). Aro da markoj posedantaj samajn aŭ tre similajn trajtojn. Kp. K.

**spekulativa** (D. speculative, speculatif, spekulativ). Kvalifikas markojn eldonitajn ne tiom pro poŝtaj bezonoj, kiom por vendi al filatelistoj.

**streketo** (FM. Sintakso de Fruictier p. 18. hyphen, trait d'union, Bindestrich). Eta linio, kuniganta erojn de vorto kunmetita.

**streko** (bar, trait aŭ barre, Strich). Pli-malpli dika linio surpresita sur markon aŭ alian afrankilon por ion nuligi.

**strio**—1. (band, filet, Band). Longa, mallarĝa peco kun paralelaj randoj. K.—2. (strip, bande, Streifen). Vico da tri aŭ multaj markoj, kunigitaj aŭ vertikale aŭ horizontale.

**striita** (V.), **vergita** (L.), **lumstreka** (laid, vergé, gestreift). (Papero) kiu havas iom diafanajn paralelajn striojn. V.

**subspeco** (minor variety, sous-variété, Unterart). Aro da afrankiloj diferencanta iomete de tipo normala.

**sukcena** (amber, ambre, bernsteinfarben). Flava kiel sukceno.

**sulkumita papero** (F. L. ribbed paper, papier côtelé aŭ rayé, geriffeltes Papier). Papero, kies surfaco prezentas paralelajn alterne franĝetojn kaj sulketojn. Tion oni rezultigas pasigante la paperon tra ruloj kun enĉizitaj etaj sulkoj.

**supre kolorita** (tinted, teinté, getönt). Pri papero, kolorita nur sur la flanko portanta la markobildon, ne trakolorita.



**sur kovraĵo** (on cover, sur lettre, auf Brief). Kvalifikas markon ankoraŭ sur koverto aŭ alia kovraĵo de poŝtaĵo, kiu poŝtvojiris.

**sur peco de kovraĵo** (on piece of cover, sur fragment, auf Briefstück). Kvalifikas pecon de poŝtokovraĵo surhavanta markon.

**surpreso** (surcharge aŭ overprint, surcharge, Auf- aŭ Überdruck). Preso farita sur markon aŭ alian afrankilon por utiligi ĝin alie ol laŭ la originala celo ; ekz. ŝanĝi la valoron, taŭgigi hejmlandan markon por kolonio, signi ŝanĝon de regnoformo ktp. Verbo : **surpresi.** Participo : **surpresita.**

**surskribo** (inscription, légende, Inschrift). La vortoj aperantaj sur afrankilo.

**surstampo**—sama signifo kiel **surpreso**, nur la ŝanĝo fariĝas per stampilo anstataŭ per presmaŝino.

**ŝam(kolor)a** (buff, chamois, sämisch). Flava kiel ŝamo.

**ŝtrumpligilo** (garter, jarretière, Hosenband). Blazonarta (heraldika) emblemo ĉe kelkaj anglaj markoj. Oni distingas **grandan, mezgrandan** kaj **malgrandan ŝtrumpligilon** (filigranoj).

**tetbeŝa paro** *(tête-bêche, tête-bêche, tête-bêche Kehrdruck). Du kunestantaj markoj, unu el kiuj aperas renversita rilate al la dua.

**tipografio** (typography, typographie, Buchdruck). Presprocedo tre ordinara, ĝuste mala je la gravuro. Ĉe ĉi tio la preslinioj kaj haĉoj sur la plato estas sulkumaj, dum ĉe tipografio ili staras reliefe (kiel ĉe ordinaraj presliteroj).

**trakolor(it)a papero** (paper coloured through, papier coloré dans la pâte, durchgefärbtes Papier). Papero, kies tuta ŝtofo koloriĝis, do prezentanta la koloron egale ambaŭflanke.

**transdoni, liveri** (to deliver, remettre, abgeben). Doni ĉe iu poŝtaĵon ricevitan de ĉe alia persono. Kp. K. Tion plenumas aŭ leteristo ĉe la domoj, aŭ oficisto laŭ peto ĉe la poŝtogiĉeto, aŭ speciala sendato de la rapidpoŝto ĉe la domoj.

**transstreko** (crossbar, barre, Querbalken). Streko horizontala inter vertikalaj ĉe litero (ekz. ĉe "A" aŭ "H").

**treso** *(tresse, tresse, Klappenstempel). Reliefa presaĵo sur klapo de koverto.

**truetaro** ([F] perforation, dentelure, Zähnung). Serio da maŝinfaritaj truetoj inter la vicoj de markoj en markofolio, por faciligi la disigon de la markoj. Por la diferenco inter truetaro kaj ruledo vd. **ruledo.** Verbo : **trueti.** Participo ; **truetita.** **Truetilo**—instrumento por trueti.

**truetaro nepenetrinta** (blind perforation, piquage qui n'a pas pénétré, Blindzähnung). Truetaro, kiu ne penetris la paperon.

**truetmezurilo,** odontometro (BL) (perforation gauge, odontomètre, Zähnungsmesser). Karto kun vicoj da diversinterspacaj presitaj punktoj, ĉe kiuj oni metas la truetparton de marko, por konstati la nombron de la truetoj en spaco de du centimetroj (konvencie fiksita longo).

**trui** (D. to punch, trouer, lochen). Fari truon en paperon per speciala instrumento (**truilo**).

**tubpoŝto** (pneumatic post, poste pneumatique, Rohrpost). Sistemo da tuboj, tra kiuj leteroj kaj aliaj poŝtaĵoj transmoviĝas al diversaj lokoj per aerpremo.

**ultramara** (BFF. LGLMRV ultramarine, outremer, ultramarinblau). Kvalifikas koloron riĉe kaj pure bluan, unue faritan el lapiso, sed nun ofte faritan arte.

**Universala Poŝtligo** (Universal Postal Union, Union Postale Universelle, Weltpostverein). Asocio el plej da civilizitaj landoj por fari komunajn aranĝojn pri la poŝto internacia.

**unuliniaj ciferoj** (single-line numerals, chiffres à trait simple, dünne Wertziffern). Ciferoj, kies konturon formas po unu sola linio.

**uzita** (used, usé, gebraucht). (Marko) servinta siacele kaj (ordinare) nuligita per ia signo.

**valoro** (value, valeur, Wert). Mezuro en monunuoj.

**valorcifero** (numeral of value, chiffre de valeur, Wertziffer). Cifero esprimanta la nominalan valoron de afrankilo.

**valorgrado** (denomination, dénomination, Wertstufe). Unu el serio da nominalaj valoroj, laŭ kiuj markeldono aperas.

**variaĵo** (variety, variété, Abart). Afrankilo, kiu iomete diferencas de normala tipo.

**vera** (genuine, authentique, echt). Ne falsita, ne imitita. K. 2.

**vergita**—vd. **striita.**

**vinruĝa** (claret, lie de vin, weinrot). Purpure ruĝa.

**vizaĝo dekstren, maldekstren** (face to right, to left ; effige à droite, à gauche ; Kopf rechts, links). Vizaĝo turnita en la dirita direkto.

**zemstvomarko** * (rural stamp, timbre de postes rurales, Semstvomarke). Marko eldonata de rusa "zemstvo" (distrikta registaro) por poŝtuzado en la distriktoj ekster la kurso de la regna poŝto.



## NOTOJ.

(Legu la Antaŭparolon.)

[1] **Blazono : insigno** (malgraŭ D.) estas laŭ uzado, vorto multe pli ĝeneralsenca. Ekz. **Esperanta insigno** certe ne estas "arms, armoires, Wappen" ! Eĉ preter la Kabe'a difino : "signo de povo, de ofico", ĝi signifampleksas, laŭ uzado, ĉian solenan signaĵon.

[2] **Filatelo :** kial ne **filatelio ?** Por tiu ĉi lasta formo oni prezentas la argumenton, ke ĝi pli konformas al la internacia **grafiko.** Prave, kaj tio estas la sola argumento por ĝi. Kontraŭe, por **filatelo** sin prezentas la jenaj motivoj : 1. **Fonetike** la formo **filatelio** kontraŭas la akcenton en la substantivoj de la lingvoj angla (akcento sur **a**), itala, hispana, portugala (akcento sur **e**) ; dum en la adjektivoj la akcento falas **ĝenerale** sur **e** (kiel ĉe **filatela**), esceptinte nur en la franca (kiu, cetere, estas lingvo teorie **senakcenta**). 2. Reg. 15 de la Fundamenta Gramatiko rekomendas preni nur unu radikon de ĉiu sencfamilio "kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto". Nu, apud **filatelio** oni uzas kiel **sendependan radikon** la formon **filatelisto,** ĉar **-ist-** derivaĵo ne glate formiĝas el la "i"-formo. Sed **filatel-** faciligas la derivaĵon, kaj respektigas tiamaniere la Fundamentan regulon. 3. La adjektivo **filatela** estas lingvistike pli regula ol **filatelia.** Ĉar la radikoj de la nacilingvaj **adjektivoj** ne finiĝas per **i**, sed la adjektivaj finaĵoj **-ic, -ique, -isch** ktp. aldoniĝas al radiko **ph(f)ilateL-.** 4. La formo **filatelo (-a)** malpliigas siagrade la unu tedegan vokalon en Esperanto, nome la akcenthavan **i.** 5. **Filatelo** estas prove uzita jam de almenaŭ 24 jaroj. 6. Ĝi troviĝas ekskluzive (sen alia formo) en la gravaj vortaroj B. F. L. K. L. M. kaj la Wörterbuch Esperanto-Deutsch, de Zamenhof-Jürgensen (ambaŭ eldonoj). 7. La nacilingva praformo, la franca **philatélie,** estas vorto moderne artefarita, proponita de M. Herpin, el Paris, kiu ĝin kunmetis (iom sencostreĉe) el Gr. **philos** (amanta) kaj **atella** (imuneco je impostoj). Ne estas atenco, al vorto **mem artefarita** elizii unu literon en la formo substantiva, por kontentigi postulojn de fonetiko, gramatika reguleco kaj belsoneco, kiam multenombraj radikoj en la Fundamento estas pli grave modifitaj el naturaj formoj jarmilaĝaj.

[3] **Nuligi :** oni proponas (laŭ etimologio de D. **entwerten**) la forman **senvalorigi.** Sed kial plilongigi terminon tre oftuzan sen praktika plibonigo ? Eĉ teorie la lasta vorto estas manka, ĉar oni certe ne "senvalorigas" markojn per la poŝta stampilo,

kontraŭe multajn fojojn poŝte stampita marko pli valoras ĉe filatelisto ol marko neuzita.

[4] **Piedo :** Esperanto ne havas nek bezonas specialan nomon por piedo de besto. La vulgara traduko "piedego" ne taŭgas por malgrandaj bestoj.

[5] **Ruledo :** jen radiko ne internacia, sed prenita el angla lingvo (kvankam etimologie la angla termino venas el franca lingvo). La motivoj por tiu ĉi neologismo estas la sekvantaj : Por la ideo de "roulette, perçage, Durchstechung" (tute ne samkiel "perforation, dentelure, Zähnung") mi trovis nenian internacian terminon : ĉiu lingvo uzas radikon diferencan. Antaŭstaris do aŭ kunmeti vorton el la jamaj Esp. radikoj aŭ preni radikon el iu unu nacia lingvo. Nu, en la Senf-traduktabelo mi notis la kunmetaĵon **trapiki.** Sed ĉi tiu havas almenaŭ du mankojn : 1. la radiko **pikpensigas** pri **punkte pintita** instrumento, kiu ne ĉiam konformas al la maŝino uzata por la procedoj ; la derivaĵo **trapikilo** prezentas laŭ uzado la ideon de instrumento uzata ĉe kuirarto. Tute freŝa termino ŝajnis akceptinda, ĉar la ideo estas unu el la plej teknikaj en la filatelo. El ĉiuj naciaj formoj, kiujn mi konsideris, la angla "roulette" ŝajnis la plej taŭga, tiom pli ke ĝia etimologio favorigus ĝin ankaŭ por francoj. Mi modifis "ruleton" ĝis **ruledo** por evitigi konfuzojn (praktike timindajn) kun derivaĵo de **rul-** (konforme al la Zamenhofa procedo ĉe **cigaredo, planedo, etikedo** ks.). La nova radiko havas la avantaĝon derivigi netan, nekonfuzeblan terminon por la instrumento, nome **ruledilo.**

[6] **Truetaro :** oni ankaŭ proponas **dent-** kaj **perfor-.** Sed **dent-** reflektas ideon ne de la rezulto de la procedo (la **truoj**), sed de la papero restanta inter la truoj, kaj la adjektivoj **delikata, kruda, nepenetrinta, neregula, neta** ktp. ne estus precize aplikeblaj. Cetere **dent-** havas tro da aliaj teknikaj uzoj (vidu ekz. Verax). Kiom pri la novradiko **perfor- :** kvankam la **formo** estas tre internacia, ĝi tute ne estas internacia en la **filetela** senco. En senco ĝenerala ĝi estas superflua, ĉar ĝian ideon prezentas la facila kunmetaĵo **trabor-.** Sed kaj **perfor-** kaj **trabor-** estus kun egala logiko aplikeblaj al la ideo de "ruledo", ĉar ili pensigas nur pri **ŝiro** de la papero, ne nepre pri **forigo** de iom da papero (fari **truon**), kiel ĉe "truetado". Kial do ne preni la vorton rekte kaj simple esprimantan la rezulton de la procedo, nome **truetaro,** kaj el ĝi formi la parencvortojn **trueti, truetita, sentrueta, truetilo,** analoge kiel Zamenhof el **truo** derivis **trui** (Wörterbuch Deutsch-Esperanto) ?